

Ni salutas partoprenantojn de la Somera Tendaro Lančov apud Vranov-barajo. Sur foto de D-ro Kubica: Lago ĉe Bitov.



## AGADO *de Esperantistoj en Jihlava*

MAJO — JUNIO 1962

## Letervespero de Esperantistoj en Jihlava

okazis la 28-an de marto 1962 en tre bela nova klubejo en Domo de Kulturo. Partoprenis ĝin preskaŭ 40 Esperantistoj. Multe da ricevitaj salutkartoj kaj leteroj el ĉiuj anguloj de la mondo ĝojigis ĉiujn partoprenintojn kaj pruvas, ke Esperanto estas la unusola kaj la

plej taŭga rimedo por solvi la lingvoproblemon kaj kontribuas al interkonatiĝo de ĉiuj popoloj en la tuta mondo.

Al ĉiuj skribintoj ni sendas ĉi tiun numeron de AGADO kiel dankesprimon. Krome, ili ricevos aŭ jam ricevis ankaŭ privatajn respondojn.

## INTERNACIA GEEDZIĜO EN JIHLAVA

Esperanto forigas lingvajn barojn inter popoloj kaj fratiĝas homojn helpante pli bone kompreni unu la alian. Ĝi servas tre bone en literaturo kaj scienco, sed same perfekte ĝi servas por komunikado de homaj sentoj. Ĝi scias esprimi eĉ la plej delikatajn kaj dolĉajn sentojn de junaj homaj koroj, la sentojn de amo. Multnombraj estas pruvoj pri tio, ĉar ofte ni legas en niaj revuoj pri geedziĝo de homoj el diversaj nacioj pere de Esperanto. Ankaŭ en nia urbo ni povis saluti tian

feliĉan okazajon: la 26-an de aprilo 1962 geedziĝis nia anino Jana Šimková kaj s-ano Alois Širca el Jugoslavio. Ili interkonatiĝo estis sama kiel ĉe miloj da aliaj kontaktoj. Esperanto-kurso, adreso, leteroj... Ĉu hazardo aŭ sorto? Ni ne scias, sed tio ne gravas. Fakto estas, ke s-ano Širca laboras nun en nia urbo kaj ke li sentas sin en nia lando feliĉa. Ni gratulas sincere kaj kore al la junaj geedzoj kaj esperas renkonti ilin ofte en niaj kunvenoj.

En majo vizitis nian urbon s-ano Moll el UTRECHT, Nederlando. Li haltiĝis ĉe siaj korespondantoj en Zďár nad Sázavou kaj en Jihlava revenante el Internacia Kongreso de Esperantistaj Fervojistoj en Budapeŝto. Dum du tagoj renkontis lin multaj Esperantistoj el Jihlava. Kelkaj el ili povis paroli la unuan fojon kun eksterlandano en Esperanto. Ĉe tiu ĉi okazo vizitis s-ro Moll la 21-an de majo prelegon pri Esperanto, kiun aranĝis la Esperanto-rondeto ĉe Ŝtata psikiatria kuracejo en Jihlava por sia personaro.

Renkontiĝon partoprenis pli ol 40 ĉeestintoj kaj gvidis ĝin s-ano Hlávka. Pri Esperanto prelegis s-ano Dásek. Pri Esperanta movado en Jihlava prelegis s-anino Chalupová. Samtempe estis aranĝita modesta, sed tre interesa ekspozicio.

OLOMOUC. V sezóně 1962/63 ĉi tiu usporádána v Olomouci celostátní výstava cestovního ruchu. Esperantský kroužek Kulturního a společenského střediska města Olomouce, který se jí též zúčastní, hodlá připravit exponát, zobrazující, kam všude do světa se dostaly informační publikace, vydané v posledních letech o Olomouci v esperantu. Za účelem získání potřebné dokumentace, vyzývá proto všechny své členy i ostatní esperantisty, kteří tyto publikace zaslali do zahraničí, aby sdělili potřebné údaje na adr.: Sekretariát Výstavy cestovního ruchu, ul. 28. října 2 (Turista) OLOMOUC. Všem, kteří této výzvě vyhovějí, budou zaslány publikace v esperantu, které budou vydány v souvislosti s výstavou, příp. i jiný materiál, týkající se cestovního ruchu.

INTERNACIA KONGRESO DE ESPERANTISTAJ FERVOJISTOJ EN BUDAPEŝTO okazis la 5-an ĝis 11-an de majo 1962. Partoprenis ĝin ĉirkaŭ 1050 Esperantistoj el 20 landoj; hungara poŝto eldonis ĉiokaze ne nur specialan poŝt-stampon, sed ankaŭ belan poŝtmarkon! Ni ricevis saluton el la kongreso de s-ano Inĝ. Jaromír Rebiček el Havlíčkův Brod, kiu post reveno rakontis al ni pri la kongreso en nia kunveno la 30-an de majo 1962.

\*\*\*\*\*

### KIU SCIAS, HELPU!

Tri fratinoj serĉas sian fraton Sypčenko Ivan Jakovlevič, naskiĝjaro 1897, kiu en jaro 1925 oficis en buterproduktejo apud Praha. Skribu al: K-do A. SIDOROV, ul. B. Ĥmelnickogo 10, Ĉerkassi obl., USSR.

\*\*\*\*\*

LA 27-an DE MAJO 1962 la ĉeĥoslovaka radio elsendis ek de la 15-a horo 25 minutan intervjuon kun profesoro Theodor Kilian el Trebič, aŭtoro de Lernolibro de Esperanto.

\*\*\*\*\*

UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO — ASOCIO, ESPERANTO — sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj en Moskvo bonege laboras. Ĝi kunvenas ek de la 19-a ĝis 22-a horo ĉiumerkrede kaj ĉiudimanche en la Centra Kulturdomo. La programo de kunvenoj estas riĉenhava pro diversaj kaj interesaj prelegoj de elstaraj Esperantistoj - medicinistoj kaj profesoroj.

Reprezentanto de UMEA por Sovet-Unio estas elstara Esperantisto Doktoro E. Salmikov.

Estas invitataj ankaŭ aliurbaj kaj eksterlandaj Esperantistoj por partopreni la agadon de la sekcio. Jen la adreso: Esperanto sekcio ĉe Centra Kulturdomo de Medicinistoj, Hecen-str., 19. Moskva, K-9, Sovet-Unio.

## sofio 1963 vokas !

La ĉefurbo de Bulgario gastigos venontjare la 48-an Universalan Kongreson de Esperanto. Ĝi okazos komence de aŭgusto. Estas ankoraŭ tro frue diri ion precizan pri ĝi, sed jam nun vi povas pripensi vian eblecon partopreni ĝin kaj komenci ŝpari monon! Ĉu ni estas tro kuraĝaj esperi, ke efektiviĝos karavano el nia lando? Ni proponis oficiale al ĈEK, ke nia rondeto estas preta organizi vagonaran ekskurson. Eble jam en venonta AGADO ni povos doni al vi pli detalajn informojn.

## Mluví m esperantsky

(Mi parolas Esperante)

8-a daŭrigo

385. Potrebuj zpevník pocho-  
dových písní. — Mi bezon-  
nas kolekton de marskan-  
toj.
386. Promínte, ještě jsem se  
chtěl zeptat, máte-li gram-  
mofonové desky. — Par-  
donu, mi volis ankoraŭ  
demandi, ĉu vi havas gram-  
mofondiskojn.
387. Chtěl bych malou kyticí z  
čerstvých květin. — Mi  
volus malgrandan bukedon  
el freŝaj floroj.
388. Máte hyacint v květináči?  
— Ĉu vi havas hiacinton  
en florpoto?
389. Přejí si černé brýle proti  
slunci. — Mi deziras nig-  
rajn okulvitrojn kontraŭ  
suno.
390. Ještě mi ukažte teploměr  
na stěnu. — Montru an-  
koraŭ al mi surmuran ter-  
mometron.
391. Potřeboval bych dobré ka-  
pesní hodinky. — Mi bez-  
onus bonan poŝhorloĝon.
392. Jak dlouho potrvá oprava?  
— Kiel longe daŭros  
la riparo?
393. To je pro mne příliš dra-  
hé. — Tio estas tro mul-  
tekosta por mi.
394. Potrebuj levně polobotky.  
— Mi bezonas malmulte-  
kostajn duonŝuojn.
395. Přezůvky nemáte? Cestou  
do zaměstnání hodně jich  
zničím. — Galoŝojn vi ne  
havas? Piedirante al mia  
okupo (laboro) mi eluzas  
(detruas) multajn.
396. Ukažte mi cestovní čepice.  
— Montru al mi ĉa-  
pojnj por vojaĝo.
397. Dejte mi, prosím, starý  
klobouk do sáčku, já si  
nový hned vezmu na sebe.  
— Mi petas, metu mian  
malnovan ĉapelon en sa-  
keton, mi surmetos tuj la  
novan.
398. Ukažte mi ještě dětské  
zimní rukavice. — Montru  
al mi ankoraŭ porvintrajn  
infanajn gantojn.
399. Tento pár je poněkud ma-  
lý. — Tiu ĉi paro estas  
iom malgranda (malvasta).
400. Ukažte mi vzory dobrých  
látek na zimník. — Montru  
al mi specimenojn de bo-  
naj ŝtofoj por vintra su-  
pervesto (surtuto).
401. Kabát je příliš dlouhý, ru-  
kávý krátké. — La surtuto  
estas tro longa, la mani-  
koj mallongaj.
402. Koupila jsem takovou o-  
byčejnou látku, ale jen  
zbytek. — Mi aĉetis sole  
ordinaran ŝtofon, sed nur  
restan pecon (restajon).
403. Kolik metrů budu potre-  
bovat na pracovní plášť?  
— Kiom da metroj mi  
bezonos por labormantelo?
404. Chtěla jsem proužkovanou  
(kostkovanou) látku, ale  
již nebyla. — Mi volis  
striitan (kvadratan) ŝto-  
fon, sed tia ne estis jam  
havebla.
405. Je to jen polovlněná (ba-  
viněná - vlněná) látka. —  
Ĝi estas sole duonlana  
(kotona - lana) ŝtofo.
406. Oholte mě - ostříhejte -  
umyjte mi hlavu. — Razu  
min - tondu miajn harojn  
- lavu la kapon.
407. Máte špatně nabroušenou  
břitvu. — Via razilo estas  
ne sufiĉe akrita.
408. Prejete si ondulaci trvalou  
nebo vodovou? — Ĉu vi  
deziras ondumajon daŭran  
aŭ akvan?
409. Cestičku mi udelejte u-  
prostřed - vlevo - vpravo.  
— La harojn dislimu  
(hardisiĝon faru) meze -  
maldekstre - dekstre.
410. Můžete mi vyžehliti mé  
košile? — Ĉu vi povas  
gladi miajn ĉemizojn?
411. Tady je soupis prádla i s  
mou adresou. — Jen no-  
maro de mia tolaĝo kun  
mia adreso.
412. Kolik se platí za kus? —  
Kiom oni pagas por unu  
peco?
413. Koupil jsem to náhodou  
velmi lacino. — Hazarde  
mi aĉetis ĝin tre malmul-  
tekoste.
414. Závodní rada se pečlivě  
stará o všechny zaměst-  
nance v tomto obchodě.  
— La establa konsilantaro  
tre zorgas pri ĉiuj dun-  
gitoj (salajruloj) de tiu  
vendejo.
415. Teprve až zaplatíte (svůj)  
dluh, obdržíte nové zboží.  
— Nur post kiam vi pa-  
gos viajn ŝuldon, vi ricevos  
novan varon.
416. Noviny vás jistě informo-  
valy o velikém rozšíření  
obchodu v našem státě,  
o našem vývozu a dovozu.  
— La gazetaro certe in-  
formis vin pri la granda  
disvastiĝo de komerco en  
nia ŝtato, pri niaj eksport-  
to kaj importo.
417. Pojedete také (na jaře) do  
Brna na veletrh? — Ĉu vi  
veturos ankaŭ al Brno  
(printempe), por viziti la  
foiron?
418. Jaké zaměstnání si přeje-  
te? — Kiun okupon vi  
deziras?
419. Už jste byl v takovém  
místě zaměstnán? — Ĉu  
vi jam laboris en tiu fako?
420. Vezmeme vás na zkoušku.  
— Ni akceptos vin provi-  
zore.
421. Umíte také psát na stroji?  
— Ĉu vi scias ankaŭ ma-  
ŝinskribi?
422. O tom rozhoduje naše zá-  
vodní rada. — Tion decidos  
nia establa konsilantaro.
423. Kdy bývá esperantské vy-  
silání? — Kiam okazas la  
Esperanta disaŭdigo?
424. Kurs ruštiny v rozhlase  
již skončil; kdy začne no-  
vý? — La radiokurso de  
la rusa lingvo jam finiĝis;  
kiam komenciĝos la nova?
425. Sledujete také vývoj te-  
lievize? Přístroje už nejsou  
drahé. — Ĉu vi ankaŭ  
observas la evoluon de la  
televido? La aparatoj jam  
ne estas tiom multekostaj.
426. Je naše stanice dobře sly-  
šet u vás? — Ĉu nia sta-  
cio estas bone aŭdebla ĉe  
vi?

(Daŭrigota)

## Význam předpon a přípon při tvoreňi slov

### PŘEDPONY

bo-	přibuzenstvo získané sňatkem (patro — otec, bopatro — tchán)
dis-	roz- (tranči — řezat, distranči — rozřezat)
ek-	počátek děje (krii — křičet, ekkrii — vykřiknout)
eks-	ex-, bývalý, (reĝo — král, eksreĝo — exkrál)
for-	odstranění (iri — jít, foriri — odejít, kuri — běžet, forkuri — odběhnout)
fi-	opovržení (homo — člověk, fihomo — darebák)
ge-	obojí rod (patro — otec, patrino — matka, gepatroj — rodiče)
mal-	opak (granda — velký, malgranda — malý)
mis-	špatně (uzi — užít, misuzi — zneužít) chybě (kompreni — rozumět, miskompreni — chybě rozuměti)
pra-	pra (homo — člověk, prahomo — pračlověk)
re-	zpět (doni — dát, redoni — vrátit) opět (vidi — vidět, revidi — opět vidět, shledat se)
sub-	pod- (skribi — psát, subskribi — podepsat) tajně (aŭskulti — poslouchat, subaŭskulti — tajně poslouchat)

### PŘÍPONY

-aĉ-	— význam hanlivý (ĉevalo — kůň, ĉevalaĉo — herka)	-em-	— náchyllost (labori — pracovat, laborema — pracovitý)
-ad-	— trvání a opakování děje (paroli — mluvit, paroladi — řečnit, iri — jít, iradi — chodívat)	-end-	— nutnost (voĉo aŭdenda — hlas, který musí být slyšen)
-aj-	— věc z určité hmoty (faruno — mouka, farunajo — moučník) — věc určité vlastnosti (bongusta — chutný, bongustajo — pochoutka)	-er-	— nejmenší část něčeho (neĝo — sníh, neĝero — sněhová vločka, sablo — písek, sablero — zrnko písku)
-an-	— člen kolektivu (familio — rodina, familiano — člen rodiny) — obyvatel (urbo — město, urbano — měšťan) — stoupenec (respubliko — republika, respublikano — republikán)	-estr-	— představený (ŝipo — loď, ŝipestro — kapitán lodi, lernejo — škola, lernejestro — ředitel školy)
-ar-	— souhrn stejných jedinců (arbo — strom, arbaro — les, monto — hora, montaro — horstvo, pohoří)	-et-	— zmenšení (tablo — stůl, tableto — stolek, — zeslabení (ridi — smát se, rideti — usmívat se)
-ĉj-	— zdrobňuje mužská jména (patro — otec, paĉjo — tatínek, Petro — Petr, Peĉjo — Petřík)	-id-	— mládě (hundo — pes, hundido — štěně, leono — lev, leonido — lviče) — potomek (reĝo — král, reĝido — králevic)
-ebl-	— možnost (vidi — vidět, videbla — viditelný)	-ig-	— učinit někoho nějakým (pura — čistý, purigi — čistiti, blinda — slepý, blindigi — oslepit) — uvést někoho v nějaký stav (kuŝi — ležet, kuŝigi — položit) — dát vykonat nějakou činnost (presi leterpaperojn — tisknout dopisní papíry, presigi leterpaperojn — dát tisknout dopisní papíry)
-ec-	— vlastnost (facila — snadný, facileco — snadnost, amiko — přítel, amikeco — přátelství)	-iĝ-	— stávat se nějakým, bezděčná změna stavu (nigra — černý, nigriĝi — černat, ruĝa — červený, ruĝiĝi — červenat se)
-eg-	— zvětšení (pordo — dveře, pordego — vrata) — zesílení (kuri — běžet, kuregi — uhánět)	-il-	— nástroj (tranĉi — řezat, tranĉilo — nůž)
-ej-	— místo činnosti (labori — pracovat, laborejo — pracovna, lerni — učit se, lernejo — škola) — místo bytosti a věcí (bovino — kráva, bovinejo — kravín)	-in-	— ženské pohlaví (viro — muž, virino — žena)
		-ind-	— hodný něčeho (laŭdi — chválit, laŭdinda — chvályhodný)
		-ing-	— nástrčka, dutá věc (plumo — pero, plumingo — násadka, kandelero — svíčka, kandelingo — svícen, fingro — prst, fingringo — náprstek)
		-io-	— země (Italo — Ital, Italio — Itálie)
		-ism-	— učení, směr (socialismo, komunismo)
		-ist-	— povolání, trvalá činnost (vendi — prodávat, vendisto — prodavač, porti — nést, portisto — nosič)
		-nj-	— zdrobňuje ženská jména (Mario — Marie, Manjo — Mařenka, Evo — Eva, Enjo — Evička)
		-obl-	— násobný (du — dvě, duobla — dvojnásobný)
		-on-	— zlomek (kvar — čtyři, kvarono — čtvrtina)
		-op-	— hromadnost (překládá se různě: du — dva, duope — po dvou)
		-uj-	— schránka (mono — peníze, monujo — peněženka) — strom (pomo — jablko, pomujo — jablůň) — země (Italo — Ital, Italujo — Itálie)
		-ul-	— živá bytost určité vlastnosti (bona dobroý, bonulo — dobrák)
		-um-	— přípona bez určitého významu (plena — plný, plenumi — splnit, aero — vzduch, aerumi — větrat)

# NIA SINJORINO BOŽENA NĚMCOVĀ (1820 - 1862)

La 21-an de januaro 1962 rememoris nia tuta popolo la centjaran datrevenon ekde la morto de la plej konata ĉeĥa verkistino Božena Němcová. Ŝi naskiĝis en Vieno en familio de princa koĉero Jan Pankl, sed ŝiaj gepatroj baldaŭ transloĝiĝis al Raŝibofice, proksime de Ĉeská Skalice. Ĉi tie travivis juna Barunka kelke da feliĉaj, neforgeseblaj jaroj kun sia avino Magdalena Novotná. Kiel deksepjara knabino ŝi edziniĝis laŭ deziro de la gepatroj al oficisto de financa gardo Josef Němec. Li jam tiam estis konvinkita patrioto. Božena Němcová firmiĝis sian nacian konscion dum restado en Polná (norde de Jihlava) kaj en Litomyšl.

En literaturon ŝi eniris per poemoj, sed baldaŭ ŝi komencis skribi fabelojn kaj mallongajn artikolojn. Ŝia vivo ne estis facila. Ŝia edzo pro sia nacia konvinko devis ofte ŝanĝi deĵorlokojn. Ankaŭ Němcová estis sub polica kontrolo. Sed ofta ŝanĝado de loko helpis al

juna verkistino bone ekkoni la vivon de simplaj homoj. Baldaŭ aperas kelke da libroj pri ĉirkaŭaĵo de urbo Domažlice kaj rakontoj pri Slovakio kaj Hungario. En jaroj de la plej granda mizero de la familio naskiĝas ŝia plej bela verko „AVINJO“. Por fundamento de la romano uzis Němcová proprajn rememorojn el juneco pri avino Magdalena Novotná. Sed la libro elstaras precipe kiel ĉarma bildeto de naciaj kutimoj kaj festoj.

Němcová ofte pruvis, ke ŝi estas kuraĝa virino. Kiam mortis nia fama ĵurnalisto Karel Havlíček post reveno el aŭstra malliberado, ŝi metis sur lian ĉerkon kronon el dorĝo. Sed senĉesa suferado ne utilis al ŝia sano. Němcová mortas ankoraŭ juna, nur kvardekdujara, en Prago. Ŝia verko ĝis nun apartenas al la plej valoraj juveloj de nia literaturo.

MIREK LYSÝ

JÁN VALAŠTAN DOLINSKY

## PROFUNDA OKULPARO

Subiris suno.  
Telero ĝia ora  
langvoro sinkis  
trans mont' bluega, fora.

Krepusk' arbara  
densiĝas ĉiupaŝe.  
Mi sola vagas  
tra ĝi embuske, kaŝe.

Ekmutis ĉie  
la birda vesperkanto,  
nur kantas mi, — mi  
la amo-prikantanto.

La ronda Luno  
min sekvas ĝis vi, kara,  
por min protekti  
de tenta nimf' arbara.

Ĝi nur ne savis  
min de la mielĉi  
kis' Via ĉasta  
kaj okulparo sorĉa!

Ha, ĉielblua,  
profunda okulparo,  
pro vi mi vagas  
sopire tra l' arbaro.

Pro vi mi vagas  
tra l' florabunda kampo;  
gitar' en mano kaj kant' surlipe,  
mi vagabondo-trampo!

(El *Almanaketo de Slovaka Esperanta Literaturo.*)

## SEPDEKJARA JUBILEULO

### j. valaštan - dolinský

Hodiaŭ (15. 2. 1962 — rim. de red.) ĝisvivas la sepdek-kon komponisto Ján VALAŠTAN- DOLINSKY. Li naskiĝis en Ĉaba, Hungario, kaj de Arad li alvenis al Myjava. Ekde la jaro 1928 li dum iu tempo vivis en Martin kiel lernejdirektoro. Ĉie li fervore kolektadis popolkantojn, adaptadis ilin kaj kantis kun siaj infanaj kaj plenkreskulaj kanthoroj. Konataj estas liaj multaj kolektoj: „Letorosť“ de Hviezdoslav, „Ĉabianske ľudové piesne“ (popolkantoj el Ĉaba), „Spevom vpred“ (kantante antaŭen „Slávme slávne“ (ni festu, festu), „Detské sbory“ (Infanaj kanthoroj) kaj du eldonoj de „Môj spevník“ (Mia kantar) kiel la aliaj, longe kantitaj kaj ankoraŭ kantataj. Konata estas precipe lia popola balado „Keď sa milý na vojnu bral“ (Kiam fraŭlo bataliris). En Martin li redaktis ankaŭ la muzikaldonon de la gazeto „Naše divadlo“ (Nia teatro) kaj la gazeton „Varyto“, eldonitan de Asocio de slovajakaj popolkantoj. Ankaŭ li kunlaboris kun „Slovenské pohľady“ por kiu li regule skribadis muzikrecenzojn, artikolojn, rimarkojn. Kora amikeco ligas lin kun nacia artisto, pentristo Martin Benka.

Krom muziko, la dua plej granda amo de la majstro estis internacia lingvo Esperanto. Dolinský estas hodiaŭ nestoro de Esperanto-movado en Slovakio. En la jaro 1936 aperis lia GRAMATIKA kaj VORTARO ESPERANTA-SLOVAKA, en 1947 FENESTRETO EN LA MONDON - lernolibro de Internacia Lingvo Esperanto, en la jaro 1949 „Granda slovaka lernolibro de Internacia Lingvo Esperanto“. Li estis kunfondinto de Slovaka Esperanto-Instituto en Martin kaj ĉefkunlaboranto de la gazeto „Esperantisto slovaka“, kie li publikigis Esperanto-tradukojn el la verkoj de Hviezdoslav, Vajanský, Krasko, Krčméry, Podjavorinská, Plávka, Jěgě, Figuli k. a.

Ankaŭ nun, post grava malsano kun malfortigita vidpovo, ni trovas Ján Valaštan-Dolinský ĉe lia laboro, ĉe la piano kaj ĉe la skribotablo. Kun sia neelĉerpebla entuziasmo li estas kaj restas brilanta ekzemplo por junaj instruistoj.

(Dr. I. HAVAŠ — el „PRÁČA“)

## LA KATO KAJ LA MUSO

En la kamero sidis la kato kaj embuskis. Subite ĝi kaptis malgrandan museton. „Nun mi manĝos vin“, diris la kato. „Mi petas, permesu al mi ion rakonti al vi“, petis la museto. „Do rakontu“ permesis la kato. La museto komencis rakonti. „Iam vivis du malgrandaj musetoj...“, „Ĉu tre malgrandaj?“ interrompis ĝin la kato. „...kaj ili loĝis en unu kamero...“, daŭrigis la museto. „Ĉu en tiu ĉi kamero?“, demandis la kato. „Iam ili ekhajtis en la forno“, rakontis plu la museto, „por ke ne estu malvarme al ili.“ „Mi ankaŭ ŝatas varmon“ pensis la kato. „Poste ili alportis pecon da viando“, daŭrigis la museto. „Verŝajne ili malsatis“, pensis la kato. „La viandon ili rostis en kaserolo kaj donis ĝin sur la fenestron, por ke ĝi malvarmiĝu.“ „Kien ili donis la viandon?“ avide demandis la kato. „Tien sur la fenestron, ĉu vi vidas la kaserolon?“ diris la museto. La kato saltis avide supren al la fenestro kaj la museto tuj forkuris kaŝigi sin en sia truo.

TRADUKIS JAROSLAV HŪDA

kato — kočka  
muso — myš  
kamero — komora  
embuski — číhat v záložce  
diri — říkat  
rakonti — vyprávět  
peti — prosit  
permesi — dovolit  
io — něco  
rakonti — vyprávět  
komenci — začít  
iam — kdysi  
interrompi — přerušit

loĝi — bydlet, obývat  
ekhaji — zatopit (rozdělat oheň)  
forno — kamna  
por ke — aby  
ŝati — míti rád  
varmo — teplo  
pensi — myslit  
poste — potom  
alporti — přinést  
peco — kousek  
viando — maso  
daŭrigi — pokračovat

verŝajne — pravděpodobně  
rosti — smažit  
kaserolo — rendlík  
doni — dát  
avide — chtivě  
demandi — otázat se  
salti — skočit  
supren — nahoru  
tuj — ihned  
kuri — běžet  
forkuri — odběhnout  
kaŝigi sin — ukryt se  
truo — díra

## MALREKTA KOMUNIKO

Riĉa anglino, kiu forveturis por ok tagoj, telegrafas antaŭ reveno al sia intendanto, ke li atendu ŝin en la stacidomo.

Ŝi demandas post alveno:

„Nu, ĉu io nova okazis en la kastelo?“

„Ne, sinjorino, nenio... ho jes, via hundeto Bobo mortis...“

„Kio? Bobo mortis? Sed de kio?“

„Ĝi forbrulis dum la fajro en la ĉevalstaloj.“

„Kio? Fajro en la staloj? Kaj la ĉevaloj?“

„La ĉevaloj ankaŭ forbrulis, same la veturiloj.“

„Sed kiel okazis tiu brulo de la staloj?“

„Estis pro fajrero fluginta de la kastelo.“

„Kio? La kastelo ankaŭ brulis?“

„Jes, sinjorino.“

„Sed kio kaŭzis ĉion tion?“

„Tio estis pro la kandeloj, kiujn oni lumigis ĉirkaŭ la ĉerko de la mastro.“

„Kio? Mia edzo??“

„Jes, sinjorino... la mastro mortigis sin eksciinte, ke lia bankisto ĉesis pagi kaj ke li do perdis ĉiun sian havaĵon.“

rekta — přímý  
komuniki — sdělit  
intendanto — správce majetku  
kastelo — zámek  
bruli — hořet  
fajro — oheň  
ĉevalo — kůň

stalo — stáj  
veturilo — povoz  
fajrero — jiskra  
flugi — létat  
okazi — stát se, přihodit se  
kaŭzi — způsobit  
kandelo — svíčka

lumi — svítit  
lumigi — rozsvítit  
ĉerko — rakev  
morti — zemřít  
mortigi sin — usmrтит se  
ĉesi — přestat  
havaĵo — vlastnictví, majetek

### ZMĚNA OBJEDNACÍHO TERMINU!

Novinářství ORBIS n. p., Vinohradská 46, PRAHA II oznamuje všem odběratelům zahraničního tisku, aby si jeho odběr pro rok 1963 zajistili včasnou objednávkou, nejpozději do 1. července 1962!

Tento objednávací termín týká se i esperantských časopisů, zejména NUNTEMPA BULGARIO, EL POPOLA ĈINIO, HUNGARA VIVO, POLA ESPERANTISTO atd.

### KURSY ESPERANTA 1962-1963

Začátkem října 1962 budou opět zahájeny kursy esperanta v Domě kultury ROH v Jihlavě, Tolstého ul. 2.

Informační schůzka všech zájemců (začátečnicků i pokročilých) bude v pondělí 24. září 1962 v 19 hodin v Domě kultury ROH.

Vyučování bude přizpůsobeno pracovním směnám účastníků kursů. Přihlašky přijíma Dům kultury ROH, nebo Fr. Tichý, Pofis, Jihlava, Komenského ul.

AGADO, neperiodický oběžník vydává Dům kultury ROH, esperantský kroužek, Tolstého 2, JIHLAVA, za spolupráce esperantského kroužku ZV ROH GRAFIA n. p. Pov. MěstNV Jihlava 163-VÁ-62. Tiskla GRAFIA JIHLAVA.

Q-17\*21773